

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj. La pasintan semajnon ni provis kompreni, kion fakte celis la projekto de internacia lingvo de Léon Bollack. Hector Hodler provis praktiki tiun lingvon kun sia gimnazia kamarado Edmond Privat por kontroli, ĉu esperanto estas vere la sola solvo. Ni vidis, ke por Léon Bollack la rolo de internacia lingvo devas sin limigi al praktikaj rilatoj, ke internacia lingvo ne devas esti literatura lingvo. Ni memorigis, kiom forte Zamenhof kontraŭstaris tiun tendencon, kiun ni povas nomi praktikismo.

A.- La Blua Lingvo estas lingvo-projekto ege originala kaj sufiĉe bone ellaborita. Per pluraj libroj kaj broŝuroj Léon Bollack diskonigis sian projekton al ses mil intelektuloj, kies apogon li provis rikolti laŭ metodo iom altrudema. Jen kion ni povas legi malantaŭ pluraj broŝuroj :

Cl.- « *Por helpi al la diskonigo de la Blua Lingvo [...] la aŭtoro alvokas la bonvolemlulojn. Ĉar aŭspicia komitato estas necesa al ĉiu naskiĝanta movado, la aŭtoro sin permesis dissendi siajn teoriajn verkojn al ses mil altranguloj en la tutan mondon, ilin petante bonvoli akcepti fariĝi protektantoj de la Blua Lingvo. La sama titolo protektanto de la Blua Lingvo apartenas al ĉiu akiranto de la unua libro.* »

A.- Kiu ne malkonsentas, tiu konsentas. Multaj personoj, ĉar ili ne resendis la ricevitaĵajn provlibrojn, vidis sian nomon en la nomaro de la protektantoj. Kaj scivolemuloj, kiuj mendis la unuan libron, estis registritaj kiel apogantoj.

Cl.- Kio estas interesa, se oni atente ekzamenas la eldonadon de la verkoj de Léon Bollack, estas konstati, ke tiuj libroj aperis en vico kontraŭa al ĉiu pedagogia logiko. Unue aperis 480-paĝa teoria libro en 1899. Poste teoria resumo ankaŭ en 1899, kiu konsistas el 120 paĝoj, kie mankas ekzemploj pri la lingvo mem. Samjare aperis mallongigita gramatiko, 60 paĝoj, kie la sola teksto estas la preĝo **Patro nia** en la Blua Lingvo : **Nea per**, kaj ses citaĵoj.

A.- Vere Léon Bollack fiksas la plugilon antaŭ la bovoj. Tamen la legantoj povis ricevi ian impreson pri la ekstera aspekto de tiu lingvo. Aŭdu la preĝon **Patro nia** :

Cl.- « *Nea per ev seri in sil ! Vea regn ey [prononco : eĉ] komi ! Vea nom ey [eĉ] santigui ! Vea vil ey [eĉ] makui in sil, so ib gev ! Ev givi nea pan taged ana ! Ev solvi nea fansu so ne solvo aye [aĉe] re ufanso na ! Ey [eĉ] seri siy [siĉ] !* »

A.- Jen du proverboj en la Blua Lingvo : « Aliaj tempoj, aliaj moroj. »

Cl.- « *Afe timu, afe moru.* »

A.- « Ĉiuj homoj estas fratoj. »

Cl.- « *Ate manu seri reru.* »

A.- Tiu lingvo-projekto dividas la vortojn inter **et-vortoj** maksimume **tri-literaj** kaj **long-vortoj** minimume **kvar-literaj**. En la proverbo : « Aliaj tempoj, aliaj moroj », la vorto **aliaj** estas en la Blua Lingvo et-vorto, kaj la vortoj tempoj kaj moroj estas long-vortoj. Aŭdu :

Cl.- « *Afe timu, afe moru.* »

A.- La long-vortoj estas konstruitaj per radikoj, kiuj neniam enhavas la literon **u** kaj nepre finiĝas kaj komenciĝas per konsonantoj. Ili estas kiel eble plej mallongaj, kaj se eble enhavas nur unu vokalon.

Cl.- **tim**, **mor** jen du tiaj radikoj. Ili signifas tempo, moro. La vokalo **u** havas gramatikan rolon. Kiel finiĝo ĝi signas la pluralon : **timu**, **moru** signifas tempoj, moroj.

A.- Kiel komenciĝo **u** signas la inecon : **kat** signifas kato ; **katu** katoj ; **ukat** katino ; **ukatu** katinoj.

Cl.- Kiel komenĉiĝo **u** ankaŭ signas verban antaŭecon : **lov** signifas amo ; **lovi** ami ; **me lovo** mi amas ; **me ulovo** mi estas amanta ; **me love** mi amis ; **me ulove** mi estis amanta ; **me lova** mi amos ; **me ulova** mi estos amanta.

A.- Kiel antaŭlasta vokalo ĝi signas la pasivecon :

Cl.- **Me lovuo** mi estas amata ; **me lovue** mi estis amata ; **me lovua** mi estos amata.

A.- La vokalo **u** plenumas multajn aliajn rolojn, kaj ni komprenas, ke la junaj Hector Hodler kaj Edmond Privat trovis tiujn rimedojn interesaj. Jen alia regulo gramatika, kiu ĉerpas sian nomon de la floro **lekanto**. Vi eble jam ludis dispreni la petalojn de lekanto recitante mi amas vin iom, multe, multe, tute ne.

Cl.- De tiu ludo, kiu esprimas gradadon de la penso estis formita regulo, kiu pere de la vokaloj **a**, **e**, **i**, kaj **o** uzataj prefikse ŝanĝas la signifon de la radikoj. Ni reprenu nian radikon **lov** amo ; **alov** signifas manko de amo ; **olov** eta amo ; **elov** granda amo ; **ilov** grandega amo.

A.- Am-deklaro povas do esti tiel gradigita :

Cl.- **Me alovo te** mi ne amas vin ; **me lovo te** mi amas vin ; **me olovo te** mi ametas vin ; **me elovo te** mi amegas vin ; **me ilovo te** mi pasie amegas vin.

A.- Bedaŭrinde por povi uzi tiujn vokalojn komence aŭ fine de la long-vortoj, la radikoj devis esti kripligitaj kiel en la lingvo Volapük. La internacie konataj radikoj **elefant**, **komet**, **kontinent** estis tro longaj por tiu Blua Lingvo.

Cl.- **Elefant** fariĝis **sfant**, el kio oni povis diri **osfant** eta elefanto ; **esfant** granda elefanto ; **isfant** gradega elefanto. **Komet** fariĝis **komt**; **kontinent** fariĝis **tnent**.

A.- Hector Hodler kaj Edmond Privat iom post iom konvinkiĝis, ke neniam ili povos asimili tiujn radikojn. Jen kelkaj aliaj : **mnal** mineralo ; **krels** hajlo ; **kirf** karoto ; **yols** [ĉols] brasiko ; **nim** terpomo...

Cl.- Kaj ĉefe ili alvenis al la demando, kiel formi neologismojn. Pri tio silentas Léon Bollack. En esperanto iu ajn rajtas prov-uzi neologismojn, ĉar la radikoj ne estas kripligitaj. Sed en la Blua Lingvo, kiu decidis pri tiuj kripligoj ? Ni scias, ke Volapük mortis inter alie pro la sama kaŭzo. La naskiĝo de la novaj vortoj dependis de arbitraj decidoj de Martin Schleyer. La Blua Lingvo enhavis la ĝermojn de la sama malsano, pro tio ĝi estis nevivipova, kvankam ĝi estis certe multe pli facila ol Volapük.

A.- Kiam Volapük naskiĝis, esperanto ne ekzistis. Nun kiam la Blua Lingvo estis proponita, esperanto estis jam sufiĉe bone konata. Por sukcesi nova internacia lingvo devus esti multe supera ĉiurilate al esperanto. Pri tio konvinkiĝis Hector Hodler kaj Edmond Privat.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-